

# NASKIĜLANDO DE ESPERANTO ATENDAS VIN!

RAPIDU ALIĜI AL LA KONFERENCO ĜIS LA 31-a DE MARTO 2009,  
LA LASTA TAGO DE LA PLEJ MALMULTEKOSTA ALIĜPERIODO!

## *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*

Ĉu Vi ŝatus ekkoni la mondan instruistaron de esperanto?

Ĉu Vi ŝatus perfektigi vian lingvokonon, interŝanĝi spertojn?

Ĉu Vi ŝatus trovi amikojn kaj kolegojn por Via ŝatokupa kaj profesia agado?

Ĉu Vi revas partopreni konferencon de la plej aktiva esperantista faka asocio — partnero de UEA pri edukado?

Ĉu Vi jam decidis partopreni en unu el la plej gravaj movadaj eventoj de nuna jaro — kunveno de Esperanto-instruistoj — veraj kaj ĉefaj disvastigantoj de la lingvo?

Ne perdu eblon fari tion en naskiĝlando de Esperanto kaj senprokraste plenigu retan aliĝilon en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php>, ĉar tempo flugadas maldece rapidege kaj tuj finiĝos periodo por malpli kosta aliĝo. Informiĝu kaj aliĝu!

### RESUMO PRI ILEI-KONFERENCO

#### POZITIVE:



- moderna konferencejo
- multaj kaj bone ekipitaj prelegejoj
- varia kaj abunda multflanka programo
- interesaj homoj
- internacia etoso
- komfortaj dormĉambroj
- bongustaj manĝoj
- samideanaj prezoj
- komuna vojaĝo al UK
- surprizoj por partoprenantoj
- kaj multe pli

#### NEGATIVE:

- la konferenco daŭros nur unu semajnon
- sekvan fojon la konferenco okazos nur post unu jaro

#### KONKLUDE:

— ILEI-konferenco estas rekomendinda kaj rekomendata ne nur al instruistoj kaj instruantoj, sed al ĉiuj lingvemuloj!

## ILEI-KONFERENCO — AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al Koleghelpa Fonduso (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al Fonduso Dazzini (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al konferenca kaso, ktp. Ankaŭ indas subteni la organizadon de nova seminario en Afriko, planata por julio 2009 en Kinŝaso.

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en [http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco\\_2009.php](http://ilei.info/konferenco/2009/konferenco_2009.php)  
Reta aliĝilo en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php>. Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Małgosia J. Komarnicka [margareta.ilei.pollando@gmail.com](mailto:margareta.ilei.pollando@gmail.com) — ĉefa loka organizanto, Radojica Petrović [rade@ikso.net](mailto:rade@ikso.net) — prezidanto de ILEI, Sjoerd Bosga [sjoerd@esperanto.se](mailto:sjoerd@esperanto.se) — kasisto de ILEI.

## La 42-a Konferenco de ILEI en Krakovo (Pollando)

**17-25 julio 2009**

**BONVENON!**